**Pakto kontraŭ la Malinformado**

civiencia.io/eo/pakto.php

# Organiza devontiĝo

## Organizo

### Nomo kaj celoj

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas internacia fak-asocio fondita en 1949, kiu kunigas instruistojn kaj edukantojn uzantajn la lingvon Esperanto. Ĝiaj celoj estas subteni la instruadon de Esperanto, disvolvi pedagogiajn metodojn kaj materialojn, organizi trejnadon kaj kongresojn, kaj antaŭenigi interkulturan komprenon, pacan komunikadon kaj respondecan edukadon tutmonde.

### Kontakto

Retpaĝo: https://www.ilei.info

Retadreso: mamduhi@gmail.com

### Senco en la batalo kontraŭ la malinformado

Kiel internacia eduk-organizaĵo, ILEI konsideras kritikan pensadon, respondecan komunikadon kaj informan konscion fundamentaj elementoj de edukado. Instruistoj ludas ŝlosilan rolon en formado de lernantoj kapablaj distingi inter fidindaj kaj misgvidaj informoj.

ILEI jam kontribuis al tiu kampo per edukaj programoj, retaj seminarioj, kongresoj kaj publikaĵoj, kiuj traktas temojn kiel amaskomunikila kompetenteco, interkultura dialogo kaj etika uzado de novaj teknologioj (inkluzive de artefarita inteligenteco).

## Devontigoj

ILEI engaĝiĝas pri la luktado kontraŭ la malinformado, akceptante la Ĝeneralajn Principojn de la Pakto kaj aldonante la sekvajn:

1. Edukado por kritika pensado: En siaj trejnadoj, kongresoj kaj retaj eventoj, ILEI antaŭenigos enhavojn, kiuj helpas instruistojn kaj lernantojn evoluigi kapablojn por kritike analizi informojn.

2. Disvastigo de bonaj praktikoj: ILEI instigos siajn membrojn interŝanĝi spertojn kaj pedagogiajn materialojn rilatajn al informado, cifereca respondeco kaj kontraŭbatalo de malinformado.

3. Etika uzado de teknologio: ILEI subtenos respondecan kaj travideblan uzadon de novaj teknologioj, inkluzive de artefarita inteligenteco, en edukaj kuntekstoj.

4. Internacia kunlaboro: ILEI kunlaboros kun aliaj organizaĵoj por antaŭenigi edukajn iniciatojn celantajn redukti la efikon de malinformado en internacia kaj interkultura medio.

Subskribas ĉi tiun devontiĝon Ahmad Reza Mamduhi, prezidanto kaj oficiala reprezentanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), en Tehrano, la 21-an de Februaro 2026.

Ahmad Reza Mamduhi